

Sabine Fiedler. Universitato de Leipzig, Germanio.

La nuna stato de studoj kaj esploroj en Esperanto kaj interlingvistiko

La prelego okupiĝas pri Esperanto kiel esplorkampo en la kunteksto de la sociaj sciencoj. Ĝi komence prilumas la du disciplinojn, kiuj pleje gravas por la studado de Esperanto: Lingvoplanado kaj Lingvopolitiko kaj Interlingvistiko, la scienco pri planlingvoj. La dua parto donas superrigardon pri Esperanto kiel esplorkampo, inkluzive de terenoj jam bone studataj kaj terenoj, kiuj urĝe bezonas investigadon. La tria parto prezentas studokazon pri la traktado de Esperanto kaj planlingvoj en la faka literaturo pri lingvistiko kaj socilingvistiko. La prelego finiĝas per tri proponoj por estonta orientiĝo de interlingvistika esploro en universitatoj: (1) Esplorado pri Esperanto metu sian fokuson je la efektiva uzo de la lingvo en aktiva kaj evoluanta komunumo. (2) Post komunika historio de pli ol 130 jaroj la variaĵo de Esperanto (inkluzive de tiu sur la diakrona ebena) estu en la centro de la intereso. (3) Por plifortigi la rekonadon de Esperanto kiel esplorkampo, ĝi estu rigardata kiel 'unu lingvo inter aliaj' sub investigado kadre de ĝeneralaj universitataj programoj kaj projektoj.

Sabine Fiedler. Leipzig University, Germany.

The current state of studies and research in Esperanto and Interlinguistics

This paper describes Esperanto as an area of research in the context of the social sciences. It starts with a brief outline of the two disciplines that are most relevant in the investigation of Esperanto: Language Planning and Language Policy and Interlinguistics being the science of planned languages. The second part consists of an overview of Esperanto as a research topic, including both fields well covered and fields calling particularly for further exploration. The third part presents a case study of what the specialist literature of linguistics and sociolinguistics has to say regarding Esperanto and planned languages. The paper concludes with three proposals on the future of interlinguistic research at universities: (1) research on Esperanto should focus on its actual use in an active and developing speech community, (2) after more than 130 years of usage, the variation of Esperanto (including on the diachronic level) should be at the centre of focus, and (3) to bolster the recognition of Esperanto as a field of research, it should be considered 'one language among others' under investigation within the general framework of university programs and projects.

Duncan Charters. Principia College, Usono.

Kiel ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, subtenas universitatan agadon

La strategio de ILEI por la subteno de esplorado kaj instruado universitat-nivele en la kampo de Esperanto havas vastan perspektivon. La raporta priskribo aparte reliefigos la jenan agadon:

- Organizado de konferencoj, simpozioj kaj publikaĵoj por membroj kaj eksteraj fakuloj.
- *Internacia Pedagogia Revuo*, malfermita al esploristoj kaj aktivaj universitataj instruistoj kiuj deziras raporti pri sia agado, kun scienca komitato kiu servas laŭbezone por prijuĝi artikolojn.
- Universitata Komisiono kiu staras preta por akcepti komisionjn kie ILEI povos subteni specifajn projektojn kaj kunordigi kun aliaj organizaĵoj dezirantaj tiun kunlaboron por reciproka profito.

Unu semajnon antaŭ la ĉi-jara Nitobe-Simpozio la UNED, la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (*Universidad Nacional de Educación a Distancia*) kies centro troviĝas en Madrido, gastigis samlongan simpozion de ILEI pri *La Kultura Heredaĵo de Esperanto*. Prof. Silvia Barreiro, Direktorino de CUID, Universitata Centro por Bita kaj Neĉeesta Instruado de Lingvoj de UNED, preparolis la celojn kaj disvolviĝon de ilia programo kiu baldaŭ inkluzivos la instruadon ankaŭ de Esperanto. La simpozio pritraktis interalie la evoluon de la sola postdiploma universitata programo pri Esperanto kaj interlingvistikaj studoj ĉe UAM en Poznan, la ŝajne eŭropan heredaĵon de la lingvo, kaj diversajn aspektojn de Esperanto kiel instrumento por interkultura lernado, kun ekzemploj el specifaj kulturoj.

Duncan Charters. Principia College, USA.

How ILEI, The International League of Esperanto Teachers, supports university-level activity

ILEI's strategy for supporting scholarship and teaching involving Esperanto at the university level is wide-ranging. In describing this, the report will give special attention to the following:

- Organising conferences, symposia and publications for members and outside scholars.
- *Internacia Pedagogia Revuo*, a journal open to scholars and active university-level teachers to report on their work, with a scientific committee to which articles may be referred for review.
- A University Commission which stands ready for assignments where ILEI can support specific projects and coordinate with other organisations desiring to work together for mutual benefit.

One week before this year's Nitobe Symposium UNED, Spain's National University for Distance Education centred in Madrid, hosted an ILEI symposium of similar length on *The Cultural Heritage of Esperanto*. Professor Silvia Barreiro, Director of CUID, UNED's digital distance language learning programs, addressed the goals and development of their program which will shortly also include the teaching of Esperanto. Among topics covered by the symposium were the development of the only full graduate academic program in Esperanto and Interlinguistics Studies at UAM in Poznan, the apparently European heritage of the language, and different aspects of Esperanto as a tool for intercultural learning with examples from specific cultures.

Roberto Garvía. Universitato Carlos III, Madrido, Hispanio.

The Esperanto movement and the social sciences

In the last two decades, the emergence and development of planned language movements, and particularly of Esperantism, has become a popular research topic in the social sciences. In this session, the author will explore some ideas that show how the history and practice of Esperantism can contribute to advance the research agenda of social sciences. The presentation will focus on labour history, sociology and social movements research, and examples will be taken from Catalonia and Spain.

Roberto Garvía. Carlos III University, Madrid, Spain.

La Esperanto-movado kaj sociaj sciencoj

En la lastaj du jardekoj, la ekapero kaj evoluo de movadoj favoraj al planitaj lingvoj, kaj aparte Esperantismo, fariĝis populara esplortemo en sociaj sciencoj. En tiu ĉi sesio la aŭtoro esploros kelkajn ideojn, kiuj montras kiel la historio kaj praktiko de Esperantismo povas kontribui al la antaŭeniro de la esplorado de sociaj sciencoj. La prezento fokusiĝos pri sindikata historiografio, sociologio kaj la esplorado pri sociaj movadoj, kaj ekzemploj estos eltiritaj el Katalunio kaj Hispanio.